

## **Zoomkunveno: lundo, 29a de aprilo 2019.**

Angela Tellier, Vicente Manzano-Arrondo, Radojica Petroviĉ, Renato Corsetti, Ivan Colling, Karina Oliveira. Pardonpetis: Elisee Byelongo

**Punktoj el la lastaj du kunsidoj jam ne fintraktitaj:** Ĉiuj donis mallongajn ĝisdatigojn pri siaj respondecoj; leviĝis nenio aparte pritraktenda en la nuna tagordo.

**Platformo por akademia laboro kaj enretaj revuoj** – ne ĉi-foje profunde diskutita; aldonendas al venonta tagordo. Oni menciis pagon al dungito dum unu/du monatoj; kiom kostus, kion dungito farus, kiu pagus (mil eŭroj?) – ĉiuj tri punktoj explorendaj. Dunganto eventuale laboru pri aro da revuaj projektoj. Oni daŭre esploras pri Open Journal Systems.

Propono de studentoj perata de VM starigi scienca revuon pri amo. VM proponis al ili (1) ke ne estu nur de la psikologia vidpunkto sed ankaŭ pri ĉiu ajn disciplino, (2) ke estu internacia kaj temu pri amo en tutmondiĝo, (3) ke estu respektema pri ĉiu lingvo, deveno, ama sistemo kaj kulturo, kaj (4) ke estu ĉefe Esperanta. Jam estis varbitaj (ne-esperantistaj) fakuloj pri psikologio, ekonomio, arkitekturo, biologio, juro, sociologio kaj filozofio. Ankaŭ venis la ideo starigi internacian neĉeestan kongreson kun laborlingvo Esperanto. La revuo aperos en OJS (Open Journal System). Necesas starigi internacian grupon da esperantistoj kiuj partoprenos en la diskuto por faciligi tian Esperantigon de scienca revuo.

Jam ni havas liston de revuoj en la retejo de UEA. Ĉiuj bonvolu aldoni al ĝi. IC proponis sendi la nomon de revuo de filozofio, kiu akceptas ankaŭ artikolojn en Esperanto. Ĉu indas meti anoncon en IPR pri niaj listoj? Bezonatas entuziasmo kaj konsekvenco por starigi kaj funkciigi retajn revuojn.

RP proponis mem studi OJS post la someraj E-kongresoj, kaj cirkuligi raporton.

**Ellaboro de konkretaj esplorprojektoj** por instigi kunlaboron inter esperantistoj kaj ne-esperantistoj; por vekti intereson ekster nia rondo.

Proponoj: (1) Lingvistika komparo inter la ĉina kaj Esperanto. (2) Kion la monda lingvo povus lerni de la ĉina. AT skribos al ĉiuj kiuj aperas en nia listo de universitatuloj, petos ideojn kaj kunlaboron.

KO starigis proponon pri fonetiko kaj fonologio de Esperanto; kreado de korpuso por kompari fonemojn en parolata Esperanto. Esplorinda. Ĉiuj bonvolu informi pri eventualaj kontaktoj.

VM raportis pri meksika studento en sevila universitato kiu celas fari tezon pri la historio de la Esperanta komunumo, precize esplorante kial ŝajne preskaŭ samaj lokoj havis malsamajn sukcesojn pri la uzo kaj disvastigo de nia lingvo.

VM raportis ke la du studentinoj el filologio finfine elektis temojn neesperantrilatajn.

Restas diskutenda **kunfando de Universitataj listoj**: Edukado.net kaj niaj listoj. RC kaj AT interdiskutu pri konkretaj proponoj.

**Publikigo de lernilo por universitataj studentoj**. RC kontaktos Federico Gobbo.

**Oficiala agnosko de la KER-atestiloj pri la nivelo de Esperanto (B1..C1)**. VM ricevis plurajn demandojn pri la fakto ke la nuna formo de la atestiloj ne uzeblas per la administrado de kelkaj universitatoj pro (a) enhavo, kaj (b) lingvaĵo. Sekvis diskuto.

VM sendos al RC la postulojn de la Universitato de Sevilo; RC kolektos ĉies bezonojn kaj dividos ilin kun IC, kiu kunlaboros.

**ILEI konferenco**: Radojica sciigis, ke la scienca komitato de la konferenco bezonas membrojn el kvin landoj, kun minimume dek prelegojn el eksterlando. RP cirkuligos retmesaĝojn kun la bezonataj detaloj.

**ILEI konferenco en Afriko**: RC skribis al sud-Afriko, laŭ peto, sed ne ricevis entuziasman reagon.

VM reprenas la taskon **intervjui profesorojn**, pri la rilato Universitato-Esperanto. Preskaŭ jam finiĝas la analizado de la intervjuo al RP.